

Komunaj referencniveloj: ĝenerala skalo

PROFESI- NIVELA	C2	Kapablas senpene kompreni preskaŭ ĉion aŭdatan aŭ legatan. Kapablas resumi informojn venintajn el diversaj parolaj aŭ skribaj fontoj, kapablas koherere reprodukti argumentojn kaj raportojn. Kapablas spontanee, tre flue kaj precize esprimi sin, distingi inter la plej etaj nuancoj de la signifoj, eĉ en kompleksaj situacioj.
	C1	Kapablas kompreni larĝan gamon da malfacilaj kaj longaj tekstoj, rekonas la implicajn signifojn. Kapablas flue kaj spontanee esprimi sin, ne tro montrante bezonon serĉi la esprimojn. Kapablas uzi la lingvon flekse kaj efike por sociaj, studaj kaj profesiaj celoj. Kapablas verki klaran, bone konstruitan, detalan tekston ankaŭ pri kompleksaj temoj, kaj dume kun certeco regas la organizajn, strukturadajn kaj koherigajn ilojn de la parolo.
MEM- STARA	B2	Kapablas kompreni la ĉefajn ideojn de kompleksaj aŭ abstraktaj tekstoj, inkluzive diskutojn rilate lian/ŝian fakterenon. Kapablas flue kaj spontanee interagi kun denaskulo, kaŭzante fortostreĉon ĉe neniu el la parolantoj. Kapablas verki klaran kaj detalan tekston pri larĝa gamo da temoj, kaj esprimi sian opinion pri aktuala temo, listigante la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de diversaj ebloj.
	B1	Kapablas kompreni la ĉefajn punktojn de informoj en klara laŭnorma lingvaĵo pri konataj aferoj, rilataj al oftaj situacioj en la kampo de laboro, lernejo, libertempo ktp. Kapablas elturniĝi en la plimulto de situacioj, kiuj povas okazi dum vojaĝo en teritorio, kie la lingvo estas parolata. Kapablas produkti simplan kaj koheran tekston pri temoj, kiuj estas konataj al li/ŝi aŭ rilataj al la propra interesokampo. Kapablas priskribi travivaĵojn kaj okazintaĵojn, revojn, esperojn kaj ambiciojn, kaj doni koncizajn argumentojn kaj klarigojn pri opinioj kaj planoj.
BAZ- NIVELA	A2	Kapablas kompreni frazojn kaj ofte uzatajn esprimojn rilate kampojn, kiuj lin/ŝin plej koncernas (ekz. bazaj personaj kaj familiaj informoj, aĉetado, lokaj geografiaj konoj, laboro). Kapablas komuniki en simplaj kaj rutinaj situacioj, kiuj bezonas simplajn kaj rektajn interŝanĝojn de informoj pri konataj kaj rutinaj aferoj. Kapablas per simplaj lingvaj rimedoj priskribi aferojn rilatajn al liaj/ŝiaj persona fono, proksima medio kaj rektaj bezonoj.
	A1	Kapablas kompreni kaj uzi bazajn eldirojn kun la celo kontentigi konkretajn bezonojn. Kapablas prezenti sin kaj aliajn personojn, starigi kaj respondi demandojn pri personaj detaloj rilate la loĝlokon, konatajn personojn kaj posedaĵojn. Kapablas efektiviĝi simplajn interagojn, se la alia persono malrapide kaj klare parolas kaj estas helpema.